

Omaĝe al d-ro August BRAUN (3), el la parolado de A. SANDOZ

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.07.24

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-174/Radiokasedo-174-15-86-B-1084-Claude-kaj-Andree-GACOND-Omaghe-al-d-ro-August-BRAUN-3-el-memorajhoj-de-A-Sandoz.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolas Claude kaj Andrée GACOND.

Lastfoje ni raportis pri omaĝo al August Braun, fondinto kaj unua prezidanto de Kultura Centro Esperantista, citante el la parolado de amiko de August Braun.

Hodiaŭ ni citas la alparolon de advokato André Sandoz, prezidinto de la urbo La Chaux-de-Fonds, kaj prezidanto de Gastejo Edmond Privat (GEP) de Kultura Centro Esperantista (KCE).

A.- Intervenante la unua en tiu omaĝo farata al la memoro de d-ro August Braun, mi volus provi kaj eble sukcesi, elvoki antaŭ vi la fizionomion de tiu persono, kiun oni povas nomi eksternorma. Por atingi tion, mi disponas du informfontojn, kelkajn biografajn notojn, kiujn bonvolis transdoni al mi via prezidanto, krome ankaŭ kaj ĉefe la memoron pri kontaktoj, kiujn mi havis mem kun August Braun, sed tio dum relative limigita periodo de lia vivo, ĉar nur antaŭ deko da jaroj mi ekkonis lin, ĝuste kiam ni komencis krei la bazojn de tio, kio fariĝis "GASTEJO EDMOND PRIVAT", t.e. kiam ek-realiĝis tiu revo instali en la urbo La Chaux-de-Fonds specon de esperanto-vilaĝeto, kiu de tiam komplete efektiviĝis. Ni esperas vivi sufiĉe longe por baldaŭ vidi ĝian pluan disvolviĝon.

Cl.- Nu, mi diru al vi, ke la bildo donita tra la notoj, kiujn mi ricevis kaj tiu, kiun mi konservas pri personaj kontaktoj kun tiu homo, tiuj du bildoj perfekte kongruas. Ili montras viron, kiun mi ne hezitos nomi "humanisto"; humanisto ne laŭ la Renesanca senco, t.e. homo nutrita je kulturo greko-latina kaj inspirita de ideologio judeo-kristana, sed tiu, kies bildo formiĝadas dum nia 20-a jarcento, t.e. homo kulturiĝinta je kontakto de la ekzaktaj sciencoj: matematiko, fiziko, sed kiu trans ili alvenas al metafiziko kaj filozofio. Tia aperis al mi August Braun, kiam mi ekkonis lin, same tia lia bildo tra la notoj ricevita. Ili rivelas orientsvicon, kiu estis la plej juna infano en familio nombranta plurajn pliaĝajn fratojn; knabo je sano iom delikata, kiu faras sciencajn studojn en Zŭrich kaj sukcesas ilin ĝis doktoriĝo, laboras poste en meteorologia fako, fine alvenante en tiun kantonon Neuchâtel por okupi funkcion, pri kiu pli detale parolos al vi s-ro Dinichert, honora prezidanto de la Svisa Laboratorio pri horloĝaj esploroj.

A.- Estas fakte dum la neŭŝatela fazo, la plej longa en sia vivo, ke August Braun kontaktiĝas kun esperanto, kiel jam klarigis tion Claude Gacond, la rekta atestinto de lia esperantiĝo iom hazarda. S-ro Braun ĉeestas konferencon de Japanino parolanta esperante, kaj francen tradukatan de Claude Gacond mem. D-ro Braun realigas tiam la valoron de esperanto por interkomunikado kaj pliriciĝo de la kulturo. Tuj li adoptas esperanton kaj studas ĝin.

Cl.- Alia aspekto, kiun necesas substreki: kiam mi diris, ke li estas humanisto, vi eble povis supozi, ke temis pri pensulo. Efektive, li estis pensulo, sed samtempe li estis homo, kiu agadas. Li demonstras tion neatendite, en lando kie posteno en kia ajn asocio estas malfacile

atingebla. Li, August Braun, iras, delegita de si mem, mi opinias, al kunveno kiu estas ja la konstitua kunveno de KCE; li eniras tien kiel aŭskultanto, li eliras kiel prezidanto!

A.- Kaj tiu prezideco ne estas momenta kaprico: ĝi daŭros dekkvin jarojn, de 1968-69 ĝis aŭtuno 1984, kiam li ekhavis seriozajn zorgojn pri sia sano. Jen, ŝajnas al mi, supreniro kiu permesas klasigi lin esceptulo, personeco malofte renkontebla. Mi volus paroli pri miaj spertoj, pri propraj kontaktoj kun li. Niaj rilatoj datumas de la epoko, kiam oni provas efektivi la volon starigi sur la komunuman teritorion de La Chaux-de-Fonds Esperanto-Centron. Traktadoj engaĝiĝas kun la municipo, kiu administris je nomo de bona societo havinta pasinton, sed ne plue iĝinta aktuala neceso. Trakti kun la urbo La Chaux-de-Fonds pri akiro de la domoj, antaŭvidi vend-promeson sufiĉe longan por ebligi al ni aĉeton de tiuj sep domoj, diskutadi, - kaj tio ne estis la plej malfacila traktado, ĉar la urba Aŭtoritato bone komprenis nin - intertrakti pri vendoprezo, pri aĉetprezo kiu ne estu tro alta por ni kaj fine organizi, trovi la juran strukturon.

Cl.- S-ro Braun tre rapide akceptis nian ideon krei juran personon sendependan de KCE, sed laborantan ĉiam harmonie kun ni, kvankam havante sian apartan povon por okupiĝi pri interezoj, kiuj fakte estis bienaj interezoj. Mi ŝatas diri al vi, ke de kunsido al kunsido, de renkontiĝo al renkontiĝo, ĉiufoje kiam ni retrovis nin por diskutado administra, s-ro Gacond, administranto de Kultura Centro, ĉiam komencis la seancon per vizito de la domoj, komentante ĉion, kio ŝanĝiĝis de la antaŭa renkontiĝo. Mi ĉiam admiris la seriozecon, kun kiu s-ro Braun sekvis ĉu la klarigojn de Claude Gacond, ĉu tiujn donitajn al ni de la arkitekto; same mi admiris la ĝustecon de liaj demandoj aparte koncerne aranĝon de la ejoj; kaj tie oni sentis ne nur la agemulon, sed la homon skrupulan en la plej eta detalo, dezirante esti informata, volante kompreni la kialojn, pro kiuj la arkitekto estis elektinta tian solvon prefere al alia. Poste, lia partopreno en la debatoj estis tre vigla.

A.- Mi citu alian econ, kiun - ĉar tio korespondas al mia temperamento verŝajne - mi multege aprezis ĉe li: lia humur-senco; ĝi manifestiĝis precipe - laŭ mia memoro - kiam Claude Gacond rakontis al ni la etajn incidentojn tragi-komikajn, okazantajn foje kun tiu aŭ alia loĝanto de la domoj, kiu sin sentis - aŭ kredis sin senti - lezita en siaj rajtoj, pensante, ke tiuj esperantistoj estis entrudemaj personoj, kontraŭ kiuj necesis ŝajnigi sin "erinaco"! Claude Gacond raportis tion kun granda seriozecon, sed tuj la situacio fariĝis malstreĉita pro ekrido de Braun, kiu diris: "Sed ĉi tie, ĉiu domo havas do sian ebriulon! Ĉar efektive unu aŭ 2 loĝantoj iom aĝaj, iom senokupaj, kiuj ne zorgis prepari sian emeritecon, opiniis trovi kompenson en eta trouzo de alkoholaj trinkaĵoj.

Cl.- Sed kiam Braun diris: "Ĉiu domo havas do sian ebriulon", li ne predikis por la Blua Kruco! Ĉar mi devas konfesi al vi, ke li alvenis al la kunvenoj kun siaj dokumentoj, kiel ni ĉiuj; sed li, el sia dokumentujo, krome eltiris botelon, dirante: "Tio estas vino el mia vinberejo"! Kaj la vinon de lia vinberejo, oni ĝin kune trinkis post la seanco!

Ni konkludis nian tri elsendan raporton pri omaĝo al August Braun per legado de parto el la parolado de André Sandoz, la prezidinto de la urbo La Chaux-de-Fonds.

Claude kaj Andrée Gacond diras: Ĝis reaŭdo!